


# Kulturaj Kajeroj


DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

**JARABONO :**

Simpla : 15 fkoj
Bonfara : 20 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes
P.Ĉ.K Nantes : 2.813.61

MARTO - APRILO

**1975 2**


(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

# KULTURAJ KAJEROJ

1975 MARTO - APRILO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jean-Paul Guillot, 21, rue des Aubépines
86 - Poitiers

Komitatanoj :

Pierre Babin
Pierre Chevalier
Simone Guillot

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

## ENHAVO

**El Grésillon**
**Esperanto tra la mondo** — A. Frangeul
**El ie en la mondo** — P. Potier
**La indiĝenaj rasoj en Ameriko (fino)** — E. Motillon
**La Esperanto-domo en Arnhem** — M. Delcourt, J. Amouroux
**Prelegoj de Grésillon :**
**« Homo kaj maŝino »**
**— La nuntempa metiistaro** — Kristos patro kaj filo
**— Enkonduko al tipa ekzemplo pri teknika evoluado en hieraŭa eŭropo** — B. Cheverry
**Jacquard, inventisto de mekanika teksilo** — B. Cheverry
**La Solulo mortos**
**Omaĝe al Gifford Fowler**
**Por via distro**

**KULTURAJ KAJEROJ**
ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

**KULTURAJ KAJEROJ**
spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

**KULTURAJ KAJEROJ**
publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

**KULTURAJ KAJEROJ**
respondos al gramatikaj demandoj

**KULTURAJ KAJEROJ**
prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn.

# *El Grésillon*

Survoje al la Franca Kongreso de Esperanto, en aŭtobuso venanta de Gresillon, dudeko da infanoj, de 9 ĝis 16 jaraj (unu eĉ nur 6-jara) kantas. Ili kantas la kelkajn kantojn, kiujn ili sukcesis enkapigi, dum kvintaga lernado por iuj, kvintaga praktikado por la aliaj. Ili ne emis al franclingva kantado ĉar jam de kvin tagoj ili banas en esperanta etoso. Ne nur matene dum la kursoj sed dum la promenadoj, okaze de la verkado kaj preparado de skeĉoj prezentotaj per marjonetoj, ankaŭ vespere dum la klub-kunvenoj. Etulo 6-jara, post tritaga lernado, jam ludis tablo-tenison kalkulante, tute nature, en esperanto. Kvankam la nombro da infanoj ne estis tre granda kvankam ili ĉiuj estis francoj venantaj el nur kvin diversaj urboj, la provo montriĝis sukcesa kaj certigis al ni, ke estas nia devo daŭrigi kaj ampleksigi la eksperimenton. Venontan jaron venu infanoj el aliaj landoj. Ne necesas, ke ili estu multnombraj. Ni scias, ke la ĉefa obstaklo estas la elspezo. Sed ŝajnas, ke almenaŭ en kelkaj lernejoj estus eble ricevi subvencion. La instruistoj ne atendu. Ili tuj esploru la eblecon.

La paralela « kurso » pri pedagogio ne ricevis saman sukceson pro manko de sufiĉe da interesatoj. Sed la fakto, ke ĉeestis du el la instruistoj partoprenontaj la ILEI-eksperimenton dum la venonta lernojaro, Sro Peek el Germanujo kaj Sro Le Magadure el Francujo, gravigis la renkonton. La interŝanĝo de ideoj kaj spertoj estis tre fruktodona. Sed ankaŭ sur tiu tereno ni ŝatus ampleksigi la eksperimenton. Nia celo ne estas okazigi prelegojn pri pedagogio sed helpi al la interŝanĝo de spertoj, informi pri metodoj kaj teknikoj kaj ebligi eksperimentadon.

Por la venonta somero malrapide sed daŭre alvenas la aliĝoj. Post nelonga tempo estas verŝajne malfacile rezervi ĉambrojn laŭdezire, ĉefe por julio. Do, Rapidu. Por la dua periodo anonciĝas prelegoj tre diversaj kaj tre interesaj. La listo estos baldaŭ preta.

Ĝis revido ! En Gresillon kompreneble.


**Por plezurigi vin aŭ la aliajn**

**okaze de la finjaraj festoj**

**CENTJARDAŬRA**
**ESPERANTA KALENDARO**




Eleganta sur via skribotablo
Praktika en la uzado
ebligas trovi iujn ajn datojn de la jaro 1900 ĝis la jaro 2000

dimensioj : 10,5 × 16 cm.

Prezo : 50,00 fr. fr. + 10 % por afranko

# Esperanto tra la Mondo

## LA UNIVERSALA KONGRESO : « POST-POSTKONGRESO » !

Tuj post la kongreso de Kopenhago, la kongresanoj povos denove kunveni en Aarhus ĝis la 6a de Aŭgusto kaj en Gotenburgo (Svedujo) inter la 6a kaj la 9a. Jen la du adresoj : Postkongreso de Esperanto, Hormarksalle 5, DK-8240 Risskov, Danlando, kaj Box 55028, S-40053 Gotenburgo, Svedujo.

## POR KLUBVESPEROJ PRI KOPENHAGO

La kongresa komitato pretigis serion de 20 diapozitivoj kaj sonbendon por pruntedoni al la interesitaj kluboj kiuj cetere, povas ankaŭ peti materialon en la danaj ambasadorejoj kaj en la danaj turismaj servoj. « Heroldo de Esperanto » ankaŭ prezentis multajn uzeblajn tekstojn en sia numero de la 18a de Marto 75.

## EN NORD-AMERIKO

— Tiujare, la diversaj esperanto-kursoj, en San Fransiska Ŝtat-Universitato, dum Julio, daŭros 4 semajnojn. William Auld (Skotlando) kaj Tatsuo Fuĵimoto (Japanio) instruos kaj prelegos pri la esperanto-literaturo en Japanio.

— Internacia Somera Kurso okazos en Georgian College of Applied Arts and Technology en Barne, Ontario (Kanado). Ankaŭ W. Auld gvidos kurson.

— La prezidanto de U.E.A., D-ro H.R. Tonkin, renkontiĝis en Novjorko kun ses funkciuloj de la Sekretariato de Unuiĝintaj Nacioj.

— La kvaronjara usona periodaĵo « Books Abroad » kiu enhavas recenzojn pri libroj eldonitaj en aliaj landoj, ĵus nomis D-rojn Tonkin kaj Wood, recenzistoj por la esperanto-libroj.

## NOVAJ LERNEJAJ EKSPERIMENTOJ

— Post la sukcesa fino de la lerneja eksperimento en centra eŭropo, Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), preparas similan eksperimenton en grupo de aliaj landoj (Aŭstrio, FR-Germanujo, Belgio, Britio, Francujo) en la triaj kaj kvaraj klasoj de elementaj lernejoj. La eksperimento komencigos ekde la nova lernojaro 1975. Estas antaŭviditaj 70 studhoroj por unu jaro. Post ĉiu kvina leciono, testoj estos kontrolotaj en la komputera centro de la Universitato Paderborn...

— En Nov-Zelando, post oficiala esperanto-kurso por instruistoj subtenita de la ministerio pri edukado, nun komenciĝas eksperimenta instruado en kelkaj novzelandaj mezlernejoj. La eduka ministerio helpis en la presigo de la instruprogramoj kaj aliaj materialoj.

La novzelanda organizaĵo de esperantaj instruistoj bonvenigas proponojn pri internacia interklasa korespondado. Skribu al : NZAET, Box 330, Wellington, Nov-Zelando.

— En Riga, ĉefurbo de la soveta respubliko Latvio, la internacia lingvo estas nedevige instruata en ses mezlernejoj.

## SEKVINDA EKZEMPLO

La turisma komisiono de Hungara Esperanto-Asocio (Poŝtkesto 2, H-7601 Pecs, Hungario), eldonis apartan broŝuron « Hungarlando invitas vin por 1975 » per kiu oni reklamas ses el la multaj ĉi-jaraj esperanto-aranĝoj en tiu lando.

## DU BONVENAJ REPRESOJ

— « Kredu min sinjorino ! » de C. Rossetti ; la vivo kaj aventuroj de bazarulo, rakontita en tre viva... kaj bonega stilo.

— « La stranga butiko », represo de unu el la plej amuzaj verkoj de R. Schwartz.

## ĈU REKORDA NOMBRO ?

Proksimume cento da esperantistaj manifestacioj estas jam anoncitaj por 1975 : plej bona pruvo de la vigleco de la esperanto- movado kaj pravigo por la optimistoj.

## ORIGINALA INICIATIVO EN JAPANIO

En Tokio, ekfunkcias « telefona servo ». Elektinte la koncernatan numeron, inter la 9a horo vespere kaj la 9a matene, oni povas havi novaĵojn pri la esperanto-movado kaj paroladojn de eksterlandaj esperantistoj.

## OFICIALA SUBVENCIO

La dana ministerio pri kulturo denove asignis 30.000 d. kr. por helpi turneon en Danlando de pupteatro el Bulgario, kiu, en Oktobro partoprenos la Pupteatran Internacian Festivalon en Zagreb.

## RENASKIĜO...

— Lasttempe, en pluraj rumanaj urboj, estis oficialigita la ekzisto de lokaj esperantaj organizaĵoj.

— Pro la anoncita Universala kongreso en Ateno, en 1976, estis reorganizita la greka sekcio de TEJO kiu aranĝos en la lando, la Internacian Junularan Kongreson de la sama jaro.

## SEMINARIO ĈE ADRIATIKO

En la Esperanto-kampadejo Primoŝten, de la 7a ĝis la 24a de Julio, okazos pedagogia seminario kun diversgradaj kursoj kaj grupoj.

Adreso : Kroatia Esperanto-Ligo, PF 703, YU-41001 Zagreb Jugoslavio.

## DUM OKTOBRO, EN ANGERS (FRANCUJO) : « LA 26 HOROJ DE ESPERANTO »

La 25an kaj 26an de Oktobro, okazos dum semajnfino, renkonto pri kulturaj kaj movadaj temoj, ligita ankaŭ al junulara rendevuo, en urba akceptejo de Angers, en Francio. Kunlaboraj proponoj kaj sugestoj estas atendataj. De nun ; skribu al S-ino Cheverry, Résidence Dupetit-Thouars, 5, Chemin d'Epluchard 49000 Angers. Ankaŭ por anonci vian partoprenon.

# EL IE EN LA MONDO

Eĉ se la proksima Oriento estas nuntempe ofte triste « laŭmoda », oni devas senprokraste revivigi pasintajn karajn memoraĵojn. Libano estas plena de historiaj kaj arkitekturaj kuriozaĵoj, sed ankaŭ de naturaj belaĵoj.

Alvenante al la lando per aviadilo, post horoj de vojaĝo sen alia pejzaĝo ol unuforma surfaco ĉu mara, ĉu dezerta, oni superflugadas la Maron Mediteraneon aŭ la Dezerton.

Nur kelkaj minutoj antaŭ la surteriĝo aperas valeoj, altaj montaroj, jen la ruĝaj tegmentoj, la mirindaj ĝardenoj kaj finfine la homa ĉeesto !

Laŭ grandegaj etendaĵoj la pejzaĝo konsistis nur el akvo, sablo, rokoj... Sur tute malgranda spaco : Libano, naskiĝis variaj formoj, esceptaj nuancoj.

Je tiu-ĉi punkto Afriko renkontas Azion, la mediteranea humanismo kuniĝis kun la spiriteco de la Dezerto. Tamen Libano certe apartenas al la Mediteranea mondo, ĝi estis solidara de Greklando, kaj ĝiaj urboj fariĝis Centroj de la Helenisma penseo.

La montaro kaj la dezerto ĉie kaj ĉiam kunestas. Fulmotondro povas eksplodi en blua ĉielo, la blovanta « Khamsin » (Ramsin), varmega vento, alportas sablon el la dezerto.

Libano ne estas simpla loko de transiro, ĝi estas gardisto de ĉiuj postsignoj, ĝi konservis kaj unuigis ĉiujn civilizaciojn.

La konkerintoj, la vendistoj, la Dioj el Egiptio kaj Mezopotamio, la Grekoj kaj la Fenicoj, la Araboj kaj la Krucistoj, la Genovanoj kaj la Turkoj, la helenistaj filozofoj, la Romaj jurkonsilistoj, la ermitoj kaj la profetoj markis tiun landon. Kompense nenio aŭ neniu, kiu eniris Libanon eliris sen transformiĝo. Libano estas fandujo, ne nur vojkruciĝo.

La strukturo de la lando estas tia : du montoĉenoj paralelaj al la marbordo, orientitaj de nordo al sudo.

La invadistoj, eĉ la « Popoloj el la Maro » (XIIa j.c. antaŭ J.K.) neniam povis establi nekontesteblan superregadon apud la maro ; tute proksime, la montaro fariĝis rezistada centro de ĉiuj neredukteblaj homoj, kaj rifuĝejoj de la minoritatoj.

Hodiaŭ, ambaŭflanke de la montaro, kvazaŭ dorso al dorso, Bejruto, la Ĉefurbo, rigardas al la maro kaj al la Okcidento, Damasko en Sirio turnas sin al la Araba mondo.

La geografia pozicio de la lando okazigis akran rivalecon inter la antikvaj urboj situantaj laŭlonge de la marbordo. Norde de Bejruto oni trovas unu el la plej malnovaj urboj el la mondo : Byblos, kaj unu el la plej atraktaj el la Oriento : Tripolo.

La ponto de Nahr el Kalb, proksime al Bejruto estas atestanto de jarcentoj da historia vivo. Ĉiu el la konkerintoj lasis tie memoraĵojn : Nabukadnecar, per kojnoformaj signoj, Ramseso la Dua, kies profilo aperas sur ŝtono oferbuĉante militkaptiton al la Dio de Tebo : Ammon ; Mark-Aurelio lasas postsignojn de siaj pensoj, la Sultano Seif de Din disvolvas arabeskojn...

Tiu malnova dudeklivaĵa ponto iam estis vojo Egipta, Roma, Araba ; apude intermiksiĝas ĉiuj venkoj en la sama dornarbetaĵo ! Kaj daŭras la historio, surskribo memorigas la pasadon de Marŝalo Allenby en 1918 kaj de Generalo Gouraud en 1920. La lasta rememorigo estas la dato de la foriro de ĉiuj fremdaj armeoj la 31a de Decembro 1946.

La vojo de la konkerintoj estis ankaŭ tiu de la Dioj : alta statuo de Jesuo-Kristo superstaras Deir Louaizeh. La Virgulino de Libano viglas super Harissa, apud la pitoreska vilaĝo Djounié. En tiu regiono Renan verkis : « La Vivo de Jesuo », apud la sankta Byblos, ne malproksime al la rivero Adonis, kie la virinoj de la antikvaj Misteroj alvenis por kune elverŝi larmojn pro la morto de la Dio Adonis.

De ĉiam tiu terparto estis ofertita al la Dioj. Jen Djebaïl, la antikva Byblos. Laŭ la tradicio estas la plej malnova el ĉiuj Libanaj civitoj. Oni dediĉis ĝin al la Dio de la Tempo, ĉe la komenco de la historio ; tiu patrono de Byblos nomiĝis EL, kaj poste fariĝis la Greka Kronos. La Egyptoj prave nomis Byblos-on « la tero de la Dioj ». Plutarko rakontas, ke temis pri religia Centro kien la Faraonoj sendis siajn oferdonojn. Oni retrovis sur la situo de la urbo restaĵoj de Egipta Templo. Poste Byblos (Djebaïl) iam estis la sidejo de Kristana Episkopejo.

Dum la Krucirado, la Francoj, same kiel la Musulmanoj, starigis fortikaĵojn. La Krucistoj same kiel la Musulmanoj starigis fortikaĵojn. La Krucistoj konstruis samrange fortikajn kastelojn kaj Preĝejojn, kies restaĵoj atestas pri la kvalito de la konstrulaboro.

Ni alproksimiĝas al Tripoli, la urbo estis origine establita de tri Feniciaj Civitoj : Sidon (Saïda), Tyr (Sour) kaj Rouad. Ĉiu el ili fondis apartan kvartalon, estas la origino de la kromnomo de Tripoli : « Triobla Civito », fakte la urbo konservas la trioblan markon de la Araboj, de la Frankoj kaj de la Turkoj. Nuntempe tri partoj konstituas la civiton : la urbo (el madina), la haveno (el mina) kaj la ĝardenoj. Tri ĉefaj elementoj, unue la tradicia Islama urbo ; la haveno, kie la oleodukto alportas la modernan « nigran oron », farante de Tripoli unu el la petrol-ĉefurboj en Oriento, finfine la produktiva libana grundo, kiu aperigas frukto-ĝardenojn meze de domoblokoj !

Paule POTIN.

# LA INDIĜENAJ RASOJ EN AMERIKO (fino)

Krom tiujn grandajn organizitajn naciojn, oni eltrovis iom post iom, multajn izolajn tribojn kun malgranda anaro, evidente en regresa stato, eĉ kelkaj estis revenintaj al tuta primitiveco. Ili ĝenerale havis pli-malpli brunan aŭ bronzecan haŭton, kaj ja ŝajnis havi komunan originon. Ili estis kredeble idoj de Lemurianoj eskapintaj el la submariĝo de la Lando-Patrino,la kontinento Mŭ. En du antaŭaj artikoloj, mi eksplikis, kiel la primitiva kontinento nomita Lemurio de niaj scienculoj, suferis submariĝon de sia orienta parto — probable la legenda Gondŭano. Poste, antaŭ eble 80 000 jaroj ĝi tute enprofundiĝis en la abismojn de la Pacifika oceano. Tiu mergiĝo kaŭzis, pro reago, leviĝo aŭ elmergiĝo de Atlantiso, la Amerikaj montoj, leviĝo de Eŭropo kaj ties montoj. Iuj loĝantoj de Mŭ povis rifuĝi en Atlantison aŭ sur Pacifikan insulon. Aliaj grupoj saviĝis en Ameriko. Tiuj grupoj, izolitaj, kredantaj sin solaj en la mondo, senigitaj de ĉiuj vivrimedoj kaj iloj, formis la Indianajn tribojn. Devigitaj sin ĉiamigi nur per endogamio ili rapide malfortiĝis. La plej multaj estingiĝis depost la Hispana invado. Antaŭ 12 000 jaroj, dum la mergiĝo de Atlantiso, kelkaj el ĝiaj loĝantoj sukcesis rifuĝi en Ameriko, kaj per edziĝoj kun Lemurianoj naskis la Majaan genton.

Sed, krom tiuj eskapintoj el la grandaj kataklismoj, oni trovis, ke kelkaj el tiuj Indianaj triboj devenis de Judoj. Kio estas pruvita de evidentaj restaĵoj en iliaj dialektoj kaj moroj. Do ni devas konfesi, ke kelkaj el la « perditaj triboj », kiuj ne sekvis Moseon en la Kanaanan landon sukcesis traveturi Atlantikon. Eksperimentoj, kiel tiu de « Kon-Tiki » demonstris la eblecon de tia vojaĝo.

Eĉ pli stranga fakto : en la regiono de Paragvajo, unu tribo, la Gajakisoj nedubeble estis el blanka raso. Antaŭ kelkaj monatoj, estis trovita en la Amazona praarbaro, tribo el blanka raso konsistanta nur el kelkaj dekoj da individuoj.

Do, tiuj Amerikaj popoloj, longatempe opiniitaj el ruĝa raso, efektive devenis de kvar diferencaj branĉoj : Lemuria, Atlantisa, Ŝemida, kaj Arja, t.e. blanka. De kie venis la blankrasaj homoj, kaj je kiu epoko ? Studoj de inskripcioj, arkeologiaj restajoj, komparoj inter Amerikaj legendoj, Skandinavaj rakontoj, iuj sagaoj ebligas certigon, ke tiuj blankaj homoj venis unue de la legenda Hiperboreo, longatempe antaŭ la Kristana erao, poste de la Skandinavaj landoj. Tio estas konfirmita de la ĝenerala kredo de ĉiuj prakolombaj popoloj, ke ilia instruinto estis blanka, barbhava Dio veninta de Oriento aŭ de Nordo, kiu forirante, promesis, reveni post nekonata epoko.

Diversaj inskripcioj sur rokoj, megalitoj, ĉefe la « mundoj » aŭ teraltaĵoj trovitaj preskaŭ ĉie en Ameriko konvinkigas pri influo de civilizoj unue prakeltaj, poste keltaj kun la Druidoj. Post tiuj envenis dum la alta mezepoko vikingoj, kaj eĉ Francaj Normandoj. La inskripcioj el runaj literoj estas atribueblaj nur al Skandinavoj ; ĉe la limo de Kalifornio, sur la bordoj de lago Klamath, ekzistas rokoj surkovritaj de hieroglifoj sur pli ol 400-metra surfaco. Ili ne estas jam deĉifritaj. Sed, oni rimarkis, ke kelkaj estas Lemuriaj literoj, aliaj pure Druidaj simboloj, la sanktaj kverko kaj lampo.

La Hispana misiestro Cabrillo (pr. : kabriljo) trovis en 1542 en la Kalifornia valo Santa Barbara, tribon nomitan la *Ĉumaŝ* posedantan veran civilizon. La urbo Santa Barbara estas konstruita sur la loko mem de ilia urbo. Ili postlasis sur insuloj de Pacifiko tute proksimaj, fortikajn konstruaĵojn, kiuj naskas admiron kaj miron de niaj modernaj arkitektoj. Ĉar tiu gento ne permesis edziĝon kun aliaj tribanoj, ĝi rapide estingiĝis. En 1532, oni kalkulis, ke ĝi konsistis proksimume el 35 000 homoj. En 1771, kalkulo de la Hispana misio montris, ke ili membriĝis nur 9 000. En 1930, restis nur unu postvivanto, nun forpasinta komprenèble.

Nuntempaj faktoj certigas, ke puraj praidoj de la Lemuria raso nun vivas en Kalifornio. Kelkajn kilometrojn nord-oriente de la granda urbo San Jose ekzistas malviva vulkano, monto Ŝasta, kies altitudo estas proksimume 4 800 metrojn. Ĝi staras meze de densega arbarego parte neesplorita. Ekde la instaliĝo de la unuaj Hispanaj kolonianoj ĝis nun, oni ofte vidis potencajn bluajn kaj blankajn lumojn el tiu monto. Multegaj personoj asertis, ke ili vidis senbruajn « aerajn ŝipojn » superflugantajn tiun parton de Kalifornio. Maristoj atestas, ke ili vidis tiajn « ŝipojn » surmariĝi, kaj ekflugi de sur la maro. Astronomo, S-ro Edgar Lucin Larkin vidis per teleskopo strangajn konstruaĵojn sur la monto Ŝasta. Estis trovita en la arbaro plata ŝtono gravurita el multaj hieroglifoj kun tiu frazo en angla lingvo : « Ceremony of Adoration To Guatama ». (Ceremonio de adorado al Gŭatama). Proksimume je la fino de la lasta jarcento aŭ komence de la nuna, mistera viro, blanke vestita, altstatura, kun longaj blankaj haroj, ŝajne tre aĝa kvankam tre vigla, eliris el la arbaro, kaj iris piede ĝis San Francisko. Li estis akceptita en la Urbdomo de tre malgranda delegacio kun grandaj honoroj. La sekreto pri tiu stranga akcepto ne estis rivelita. Kvankam, ili ne neas la fakton, la oficialuloj ĉiam rifuzis informojn, kaj eĉ ne volis sciigi la daton de la evento. La gazetaro tre ofte menciis la strangajn faktojn pri monto Ŝasta. Do, certe apenas, ke ekzistas sur la monto Ŝasta, meze de la samnoma arbaro, Lemuria gento, memvole izolata, kaj vivanta per siaj propraj rimedoj. Mistero ne jam klarigita.

Ĉiel, eĉ konsiderante kiel legendon aŭ imagaĵon, la dirojn pri monto Ŝasta, ni devas konkludi, ke la populara bildo de Amerika kontinento, de jarmiloj izolita inter du oceanoj, kaj loĝata nur de sovaĝuloj ĝis la eltrovo de Kolombo, devas lasi lokon al pli ĝusta koncepto. Ĝi estis patrolando de altaj civilizoj kiam nia « Malnova Mondo » apenaŭ komencis civiliziĝi, kaj pli-malpli sporade, ĝi estis dum jarcentoj vizitita de Eŭropanoj ; ĝiaj indiĝenoj havas komunan originon kun la aliaj popoloj sur la tero. Tio evidentigas la nocion de unu sola homa familio sur nia planedo ; familio aĝa pli ol centmilojn da jaroj, disigita de teruraj kataklismoj. Ĝi devas retrovi sian originan unuecon, kaj ankaŭ la sciencon kaj saĝon de siaj unuaj prapatroj. Ja, Multaj serĉantoj strebas atingi tiun celon. Niaj scienculoj multe lernis per la modernaj metodoj, pri la fizika, materia, perceptebla parto de la universo. Aliaj homoj, kiel la rozokrucanoj kaj aliaj mistikuloj, studas la nevideblan, nematerian universon, kaj la antikvan tradicion tiel malnovan kiel homaro. Ni devas esperi, ke post kelka tempo, sintezo de la konoj akiritaj de diversaj fontoj de scio, efike kontribuos al la evoluado de homaro kaj al ĝia feliĉo.

Eloi MOTILLON.

# La Esperanto-domo en Arnhem

La sekvanta artikolo celas rememorigi aŭ konatigi al la amikoj de Grésillon entreprenon similan funkciintan iom antaŭ la dua mondmilito kaj danke saluti la meritojn de homoj kiuj tiom multe faris por Esperanto.

La 24-an de majo 1930, en Hago, Julia Isbrücker, nederlanda, kaj Andreo Csech (Ĉe), rumandevena, ambaŭ multvaloraj propagandistoj, kunfondis la Internacian Cseh-Instituton de Esperanto.

Dum la jaro 1930 Andreo Ĉe gvidis Esperanto-kursojn en Arnhem, ĉefurbo de la plej bela provinco de Nederlando : Gelderlando.

La kursojn vizitis ankaŭ la urbestro de Arnhem Sro Dro Salomon Jean René de Monchy (en 1934 li fariĝis urbestro de Hago) kaj la skabeno de la publika instruado Sro B. Bakker.

La talento de la instruisto, la efikeco de lia propre imagita « rekta metodo » produktis multajn fruktojn : ne nur multajn novajn esperantistojn sed tian interesiĝon flanke de la urbestraro de Arnhem ke ĝi proponis senpage disponigi al la Instituto grandan domon meze de belega vasta parko kun la celo ke ĝi estu hejmo por kunvenoj de esperantistoj, internaciaj konferencoj kaj Cseh-metodaj kursoj.

Kompreneble tiu malavara propono estis danke akceptita kaj, helpe de la Arnhema kaj nederlanda esperantistaro, realiĝis la kara revo.

La Esperanto-Domo ekfunkciis la 11-an de aŭgusto 1931 per internacia kurso de Andreo Ĉe por 56 geinstruistoj kaj lernejestroj el 11 landoj. Tiu unua kurso daŭris dum 11 tagoj kun po 4 instruhoroj ĉiutage.

La Domo fariĝis kvazaŭ « Esperanto-insulo ». Esperanto estis ekskluzive uzata kiel oficiala kaj sola lingvo.

La ĉambraro konsistis el ne nur porkursa kaj konferenca salonoj sed komforta hotelo por 50 personoj. Ĉiuj pordaj surskriboj estis nur esperantlingvaj kaj sur la tabloj de la restoracia ĉambrego la menuoj estis redaktitaj en Esperanto kaj same nian Lingvon parolis eĉ la policisto deĵoranta en la parko.

Oni vere sin sentis en Esperantujo. La sindonemeco de la prizorgantoj kaj la konstanta samideana etoso ankoraŭ pli tion akcentis.

La aranĝojn kompletigis konversacia salono, lego-ĉambro, biblioteko kaj vendejo de libroj kaj diversaj esperantaĵoj.

Dum la someroj 1937, 1938 kaj 1939 la Domo havis sian propran poŝtkontoron kiu uzis esperantlingvan poŝtstampon. La ĉi-kune fotita specimeno havas la apartan meriton memorigi la kvindekan datrevenon de la apero de la « Unua Libro », por rusoj, de D-ro Esperanto (26-7-1887).

« La Praktiko » — « la gazeto kiu instruas kaj amuzas » —, kies unua numero aperis en januaro 1932 fariĝis la monata organo de la Domo.

Ĝi abunde kaj ilustre rilatis pri la vivo en Arnhem sed ankaŭ pri la Esperanto-vivo entute. Multilustrita, bone redaktita, enhavoriĉa kun interesaj kronikoj : la fama « lernu per la eraroj », « la mondo ridas », « la mondo estas interesa », konkursoj kaj amuzaĵoj ktp. Tre rapide ĝi fariĝis unu el la plej legataj Esperanto-periodaĵoj.

La ĉefaj celoj de la Domo estis aranĝi kursojn, konferencojn kaj specialajn seminariojn por formi Cseh-metodajn instruistojn sed ĝi estis ankaŭ tre ŝatata kiel somera libertempejo kaj ripozejo.

En 1931 estis aranĝita granda loterio aprobita de la nederlanda Ministro por Justeco kun aŭtomobilo Nash, 6 cilindra, 5 persona kiel unua premio, por finance helpi la instaladon de la Domo.

Dum Paskaj tagoj 1932, okazis la « Unua Internacia Lingva Konferenco » en Arnhem.

La ĉefa celo de tiu kunsido estis diskuti pri la lingvaj problemoj komparante la spertojn de diversnaciaj uzantoj de nia lingvo kaj pri gramatikaj demandoj.

Rajtis partopreni ne nur la ĉeestintoj sed ĉiu ajn esperantisto povis, letere, sendi sian opinion.

La konferenco ne havis oficialan karakteron kaj ĝi ne volis fari decidojn. La rezolucioj aŭ deziresprimoj rezultintaj de la diskutoj estis poste transsendotaj al la Akademio.

En sia fina raporto la konferenco konkludis, unuanime, pri la vivanteco kaj kontentiga lingva evoluo de Esperanto, faris kelkajn rekomendojn al la Lingva Komitato pri elektado de plej spertaj lingvosciantoj kaj petis al recenzistoj ke ili verku, senpartie, sed severe kaj utile, siajn artikolojn. Fine la konferenco petis al la Akademio esplori kelkajn gramatikajn demandojn kiujn ĝi precize citis.

En 1934 fondiĝis « Amikaro de la Esperanto-Domo » celante subteni morale kaj finance la gravan entreprenon.

Miloj da homoj eklernis Esperanton aŭ plibonigis siajn konojn de la lingvo en Arnhem, kelkfoje kun oficiala apogo.

Tiel eminentaj prelegantoj kiel E. Privat, S. Pragano kaj multaj aliaj ĉarmis kaj konvinkis la aŭdantaron.

Sed la militeksplodo nigrigis la serenan ĉielon.

En aprilo 1940 Julia Isbrücker lanĉis alvokon :



ARNHEM. La Esperanto-Domo.




« Nun, kiam ĉirkaŭ ni furiozas malfido, malamo kaj malpaco ni, esperantistoj, devas pli ol iam kolektiĝi kaj niajn fortojn unuigi ».

Ŝi esperis, sed vane, funkciigi la Domon dumsomere almenaŭ por la nederlanda esperantistaro kaj, tiucele, ŝi interkonsentis kun la Nederlanda Vojaĝ-Unuiĝo.

Post la kapitulacio de la nederlanda armeo kaj la nazia invado en majo 1940 la poŝtaj rilatoj kun eksterlando fariĝis malfacilaj.

La nazioj okupis la Domon kiu fariĝis sanatorio.

La urbestro de Arnhem transportigis la hotelan meblaron, la litaĵojn por 50 personoj kaj la restoracian instalaĵon por 100 personoj kune kun multaj libroj al iu subtegmenta tenejo. Sed, en septembro 1944, okaze de la fatala katastrofo de Arnhem la materialo pereis.

« La Praktiko » pene sed regule aperis ĝis februaro 1941. Poste ĝi silentis ĝis 1946.

Tiel finiĝis la historio de la Esperanto-Domo en Arnhem.

Samcele, samideale, samsindoneme, samtipe, kun la samaj financaj problemoj, ĝojoj kaj esperoj nun estas mastrata kaj funkcias nia kara Grésillon kaj ĝia organo « Kulturaj Kajeroj ».

Aŭgusto 1974

Por « Kulturaj Kajeroj » kunlabore verkis :
Marcel DELCOURT (Tourcoing)
Jean AMOUROUX (Perpignan)

# PRELEGOJ DE GRESILLON

## "HOMO KAJ MAŜINO"

### LA NUNTEMPA METIISTARO

Metiisteco, havas, tamen profundajn radikojn en la landoj kaj en la Homoj. Kial ? : Ĉar ĝi estas la esenco mem de la homa estaĵo, kaj ĝi tiel bone konvenas al la laboristo kiu praktikas ĝin, ĉar ĝi estas la rezultato de malrapida koncepto dum la tempoj, realigita de la homo kaj por la homo, laŭ lia simileco, liaj emoj kaj liaj eblecoj.

Vidalvide de estonteco, pri kiu multaj gejunuloj timas ke ĝi eliros al nenio, la metioj sin prezentas kiel kreantoj de personeco.

Tio estas ilia tradicio kaj ilia honoro.

La metiisteco, nuntempe, estas je unu el la pintoj de la industria progreso. La N.A.S.A., mem, konsciis pri tio, kaj mendis specialaĵojn ĉe francaj metiistoj. Ekzemple pri spegulfabrikado.

Necesas denove malkovri ke la aktivoj proponitaj de la metioj nun estas la solaj kiuj prezentas laborkoncepton je la skalo de la homo. Dum tiu tempo, kiam oni kulpigas la ĉenlaboron kiu alportas senpersonecon, metiisteco proponas la solvon pri tiuj ofendoj al la homa digno.

Gajni monon ne sufiĉas, ŝajne. Necesas por la homo : pensi, krei, agi. Tie, eble, estas la klarigo de strangaj anakronismoj nun kreskantaj tie ĉi kaj tie en nia mondo. Ĉi tie ekaperas potisto, tie teksistoj kiuj pacience ĵetadas antikvajn nevetojn. Dise aperas someraj kursoj : ferarto, korbarto, puntarto, ŝtontajlarto k.t.p.

Ĉu estas nur fulma modo ? Ĉu estas sendaŭra ekgalopo ? Ne, estas serĉado de la vereco, tiu de la vera homa destino.

Ŝajnas, feliĉe, ke oni ekzorgas pri la kvalito de la vivo, la kvalito de la homo.

Elsurprizitaj de la blinda galopado de nia senbrida civilizacio, ni iom post iom enkapigas ian ideon de misdirekto.

Okaze de tiu ekkonscio lokiĝas la bonŝanco de la metiisteco.

Metieco, kiu enhavas manan kaj mensan parton, ebligas la laboriston ekvilibri sian personecon kaj sian sanecon, korpan kaj mensan. Necesas kune funkciigi la kapon kaj la manojn kaj maikrei tiun stultan troan specialigadon, kreitan nur por avantaĝi la kapitalon.

La nuna metiistaro estas kreanto de oficoj en kiuj oni travivas liberan kaj sendependan laboron, tion pruvas la kreskanta aro da metiistoj, kiuj aliĝas al metiistaj organizoj.

Kompare al industrio, en kiu la brakoj estas pli kaj pli konkurencataj de la maŝino, kaj en kiu la kolektivaj senlaborigoj iĝas kutimaj, metiistaro ja estas kreanto de deĵoroj.

Sed, ĝi bezonas jam spertajn laboristojn, nek forjetitulojn nek mekanikulojn.

La nuna tendenco pri profesia orientado konsistas en elektado de la plej bonaj por la granda industrio kaj la ŝtataj oficoj, forlasante la aliajn por la metioj.

Estas grava eraro.

Eĉ antaŭ nelonge, koncerne la dungadon, ĉiu profesio ĝuis samajn ŝancojn. Ĉu pli malbone ?

Ne kondamnante la progreson, oni povas kaj devas konstati, ke ĉio lasita de la antaŭaj generacioj estis farita de metiistoj, kiuj laboris per la manoj, la kapo, kaj la koro.

Tiu materia kaj spirita heredaĵo, tute valora, estis pacience konstituita de generacioj de metiistoj, kiuj donis sian laboron, sian kredon, kaj sukcesis krei vivmanieron.

Tiu ĉi estus ankoraŭ multe pli bona, se la trouzema socio kiu subpremas nin ne denaturigus ĝin.

La nuna mondo, serĉante sian perditan originan ekvilibron, bezonas filozofion.

Jen unu, kiu donis siajn bonpruvojn. Kaj ĝia merito estas ke ĝi forĵetas neniun alian : estas Laboro kaj ŝparo.

La metiistaro konservis tiun vivmanieron kaj tio estas ankoraŭ la plej bona heredaĵo donacita de niaj antaŭuloj.

La metiistaro estas pasinteco, kiu ne volas morti, kaj la popoloj, kiuj perdas siajn metiistojn, ankaŭ perdas siajn tradiciojn kaj radikojn.

Ni volas klopodi por humanigi la kreskadon de nia industria socio. Estas plia kialo por subteni la kreskadon de tiuj entreprenoj.

La gepatroj devas scii, ke la geinfanoj elektante lernadon de metio, ne elektas rabatitan lernadon, tut-kontraŭe.

Metiista diplomo ja egalas alian, kaj metiisto titolita kiel : « Plej Bona Laboristo en Francio », pri sia metio, tiom valoras kiom universitata diplomito.

Metiistoj fabrikante kaj riparante bonkvalitajn kaj tute nepre necesajn objektoin ne ĉenlaboras ; kaj la rezultato de iliaj penoj kelkfoje ŝajnas multe kosta.

Sed necesas profunde konscii, ke la metia kvalito, unu el la plej bonaj por la vivkvalito, tute ne rilatas al la kvanto aŭ la grandskala laboro.

La rilato eĉ estas absolute kontraŭa.

Kristos patro kaj filo.

## PRI TEKNIKA EVOLUADO EN HIERAŬA EŬROPO

Laŭlonge de la jarcentoj, ne dube, same kiel arta elpensado, teknika evoluado fontis el aŭdaco, liberigado kaj disrompo de enradikitaj tradicioj plej diversaj. Paralele, tuta historio de la teknikoj konsistas ne nur el priskriboj pri la sinsekvaj malkovroj fare de kleruloj, inĝenieroj aŭ simplaj metiistoj, sed plue, estas ligita al gravaj sociaj faktoj kiuj, momente, favorigis aŭ bremsis, ampleksigis aŭ tute ŝtopis la evoluadon de la homo, tiuokaze konsiderata kiel malkovranto de mekanikoj kapablaj transformi la naturon.

Tutcerte, la instinkto al mekaniko de la homoj manifestiĝis de ilia ĉeesto sur la terglobo kaj la unuaj plej primitivaj iloj jam celis al plilongigo, fortigo, do bonigado, de la homaj membroj mem. Tiurilate, malkovroj pri tre antikvaj sed gravaj civilizacioj lasis al ni daŭrajn provojn pri homa genio. Malkovroj ne tute perditaj malgraŭ longdaŭraj sombraj periodoj kiuj, ekzemple en Eŭropo, de la fino de la 4-a jarcento de nia erao droniĝis en tuta forgeso sekve de multnombraj balatantaj, do detruantaj, popolmigradoj. Oni bone scias, ke dum pluraj jarcentoj la popoloj civilizitaj de la Romanoj, ili mem de la Grekoj, revenis al vivnivelo preskaŭ komparebla al tiu de la prahistorio. El tio rezultis ke la tiamaj simplaj homoj devis repreni la teknikan progreson de la komenco, meze de konstantaj malhelpaĵoj. Tamen, kelkfoje, neatenditaj estis la postsekvoj de gravaj politikaj aŭ religiaj krizoj, de invadoj, militoj eĉ epidemioj kiuj, ekzemple je la 14 kaj 15-aj terure maldensigis la Eŭropan loĝantaron. Ja, rimarkinde estas, ke ĉe tiaj epokoj la perdo de grava procento de la populacio, do ankaŭ de la laborantaro, enkondukis kaj ampleksigis serĉadon kaj uzon de helpantaj mekanikoj. Samtempe, oni povas rimarki, tuj de la fino de la Mezepoko, unuajn enmiksiĝojn de iu kapitalismo en la naskiĝanta industria produktado. De tiam, oni povas konstati tre gravajn teknikajn progresojn aparte koncerne la mar-transportojn, vojaĝojn, interŝanĝojn plej diversajn. Sekvas, ke en Francio, ekzemple, jam de la 17-a jarcento, la reĝaj potenco kaj politiko celis al plilariĝo de la landa ekonomio. La nomo de la reĝ-ministro Kolbert (Colbert) restas ligita al la unuaj provoj pri racia organizado de la nacia produktado. De tiam, ekaperas la unuaj « manufakturoj », kiuj jam antaŭanoncas la « grandan industrion ».

Ni alvenas al la 18-a, kaj la tiamaj verkistoj jam konstatas, kaj elmontras, ke la modernaj progresoj de la jarcento devenas pli de la teknikaj eltrovaĵoj, ol de la filizofiaj pripensoj. Inter aliaj, jen Voltaire, priparolanto pri la epoko. Li akcentas la jam favorajn antaŭjuĝojn pri mekanismo kiu komencas mirigi la samtempulojn. Jen Franklin, kies reputacio pri praktika scienco restas fama. Jen Diderot, kiu, respondante la deziron de Leibnitz deziris mem studi pri la industriaj artoj cele al posta diskonigado ? La 18-a ankaŭ estas la jarcento, kun Vokanson (Vaucanson), de la aŭtomatoj, iuagrade antaŭanoncantoj de la modernaj maŝinoj kapablaj anstataŭi komplete la homojn.

El tiuj rimarkoj oni, povas konstati, ke de la komenco de la 18-a, la kuriozemo de la kleruloj, la esperoj de la filozofoj, la lerteco de la inventistoj povis reale antaŭenirigi teknikajn progresojn kun la aprobo de la ŝtat-potenco. Sed, kion pensis pri tio la tiamaj manlaboristoj ? Nekontesteble, ilia malfidemo rilate la noveltrovitajn maŝinojn estis grandega, aparte en teks-industrio, kiu, en Francio, ĝis la mezo de la 19-a jarcento restis la ĉefa industria produktado. Nur sub la Napoleona administrado superregis mekanismo en teksa-industrio, kiam, aparte pri kotona teksado, la Britoj antaŭis la Francojn. Jam de 1733, ili inventis moveblan glit-bobenon kiu tre rapidigis la teksadon. Aliparte, ekaperis la « Jenny », ŝpin-maŝino kiu, iom post iom, anstataŭis la antikvan rad-ŝpinilon de la avinoj kaj, en 1735, la mekanikan teksilon, kiu rapide eniris Francion. Ĉar por ilustri la tre malfacilan alpason de man al maŝin-laborado, mi elektis paroli pri la franco Jacquard (Jakar), kies vivrakonto sekvos, mi tuj devas diri, ke la tiamaj angl-devenaj maŝinoj celis al simpla teksado de kotonaĵoj, kiam la inventaĵo de Jakar temis pri silk-teksilo kapabla fari, mekanike, riĉajn ŝtofojn kun enaj belegaj desegnaĵoj. Certe, jam delonge tra la mondo, teksiloj estis uzataj sed ankoraŭ nur movigeblaj de la manoj.

La franca urbo Liono (Lyon) delonge estis aparte fama pro siaj silkteksaĵoj kaj ties negoc-formo. Komence de la 18-a, Lionaj komercistoj kiuj vendas ŝtofojn al vasta klientaro ne posedas mem metiilojn. Ili aĉetas krudajn silkojn, kiujn ili konfidas al ŝpinistoj poste al teksiestro. Tiu-ĉi mem teksas, ankaŭ teksigas laŭ la nombro de la posedataj metiiloj. Kune kun sia tuta familio, edzino, geinfanoj, geavoj, la teksiestro laboras tiom, kiom li povas. Sur la restantaj iloj laboras kunlaborantoj pagitaj po duono de la prezo donita de la komercisto-fabrikanto al la teksiestro kiel laborpago. Kial do la nomo « komercisto-fabrikanto » ? Nur pro tio, ke li postulis de la realigantoj siajn proprajn dezirojn pri koloroj, kvantoj, kvalitoj, desegnoj, ktp.

En 1831, oni kalkulis en Liono, aparte en la kvartalo « Croix-Rousse », pri 40.000 « canuts », loka nomo de la silkaj teksi-laborantoj. Kial ili, ĉe tiu dato ne ankoraŭ estis ĉenlaborantaj en grandaj fabrikoj ? Verŝajne pro-tipa individualismo kaj ŝajno de pli granda labor-profito. Samopiniis la negocistoj, kiuj tiamaniere, plej facile, laŭ la kadenco de la mendoj, povis superregi la fabrikadon sen granda mal-profito por si mem. Facile imagebla estas la sorto de tuta familio kiam laboro mankis. Tiam, de personaj grumbloj al grupaj strikoj elspruĉas ribelego. Barikadoj stariĝas. La « canuts » amase trairas la stratojn kun grandega nigra flago je tia surskribo : « Vivi laborante aŭ morti batalante ». Ve ! Ĉiufoje, post granda timigo al la « kapitalistoj », ili ne sciis trafe uzi sian ĵus konkeritan povon kaj revenis al la antaŭa stato. Kiamaniere reagi kontraŭ novaj teruroj alportitaj ĉi-foje de maŝinoj, anstataŭantoj de man-laboristoj kaj produktante multe pli ol ili ? Ili diris « Baldaŭ, ni ne plu povos

vivteni. Bezonos nur sentaŭguloj por movi turnilojn. Ĉu la plej fortaj, kapablaj, kuraĝaj el ni devos morti ? »

Legante pri la vivo kaj eltrovo de Ĵakar, vi provos sekvi la vojiradon al mekanik-progreso en franca silkteksado.

## JACQUARD (ĴAKAR) INVENTISTO DE MEKANIKA TEKSILO

Ĵakar naskiĝis meze de la 18-a jarcento. Li estis filo de kamparano, posedanto de eta bieno, kiun li vendis por aĉeti proprajn teksilojn kaj instaliĝi en Liono, allogita de gajnoj supozeble pli altaj ol la kamparaj. De tiam, forlasinte la terkulturadon, la patro Ĵakar sidis la tutan tagon ĉe sia teksilo, kun la edzino kiu laŭtlegis la desegnon de la modelo kaj la knabo kiu, li, devis tiri konvenajn ŝnurojn ekster la atingo-povo de la teksisto. La gepatroj de Ĵakar malgraŭ intensa laborado restis tre malriĉaj kaj ne kapablis doni al la infano multe da edukado. Kiam la knabo estis sufiĉe jaraĝa, la patro enirigis lin kiel metilernanton ĉe librobindisto. Bonŝance, tie la juna Ĵakar trovis maljunan komizon, kiu donis al li elementajn lecionojn pri matematiko. La knabo baldaŭ montris, apartan talenton por la mekaniko pere de inventaĵoj kiuj jam mirigis la maljunan komizon. Tiu-ĉi konsilis al la patro trovi por la filo metion pli taŭgan por ekzercado de la junaj talentoj. Ĵakar transiris al tranĉilisto. En la nova laborejo, tre atentema, li longe cerbumis kaj inventis maŝinon kapablan fari dum kelkaj horoj la tag-laboron de kvar metiistoj. Sed tiuj-ĉi, timante la perdon de laboro tuj detruis ĝin kaj la mastro mem kondutis tiel kruele kontraŭ la fraŭlo, ke li, denove, devis ŝanĝi. Li komencis labori ĉe fandisto de presliteroj. Ve ! Tiam mortis ambaŭ gepatroj de Ĵakar. Necesis, ke li akceptu la du teksilojn de la patro kaj iĝu mem teksisto. Tuj li komencis plibonigi la metiilojn : Ĉu ne estus eble aldoni kelkajn radarojn kiuj malpenigus la laboron de la helpantaj geknaboj ? Ĵakar serĉis. Baldaŭ, li tiom dronis en siaj inventaĵoj, ke li tute forgesis labori kaj baldaŭ troviĝis senmona ! Li eĉ devis vendi siajn teksilojn por pagi siajn ŝuldojn ! Liaj sammetiistoj primokis, riproĉis lin kiam, samtempe, li surprenis aldonan financan respondecon : li edziĝis. Feliĉe, lia edzino konsciis pri la sincero de la serĉado kaj la genio de la edzo. Sen plendi, ŝi vendis siajn propraĵojn eĉ la liton por pagi la ŝuldojn de la serĉanto. Baldaŭ la paro troviĝis en tiel mizera stato, ke Ĵakar devis vendi la patran dometon, iri por labori en alia urbo kaj ĉe ŝnuristo, kiam la edzino restis en Liono kie ŝi povis apenaŭ vivteni sin per manfabrikado de pajlaj ĉapeloj.

Ŝajnas tamen, ke daŭre Ĵakar inventadis ĉar en la jaro 1790, li publikis inventaĵon por plibonigi la tipon de teksilo, kiun oni tiutempe uzis por la fabrikado de ŝtofoj kun desegnoj. Tiu inventaĵo ebligis teksi sen helpo de tirknabo. Post dek jaroj 4.000 el tiuj inventaĵoj estis uzataj. Ve ! la progreso de Ĵakar krude interompiĝis : la franca Revolucio eksplodis. Unue, li batalas kiel volontulo poste en la Rejna Armeo. Sed pro morto de lia plej aĝa filo paftuŝita flanke de li, Ĵakar ne plu povas elteni la militan vivon. Denove, li forkuris kaj revenis en Liono por retrovi sian edzinon, ĉiam mizeran. Kaŝe, li loĝis ĉe si, en subtementejo, pensis pri novaj inventaĵoj. Nur mankis la mono por realigi ilin. Fine, li devis eliri el sia kaŝejo por serĉi dunganton. Bonŝance, li trovis inteligentan fabrikanton. Dumtage li laboris, dumnoke, li daŭre inventis. Iun tagon, li menciis al la mastro eblajn gravajn plibonigojn ĉe la teksiloj... kaj samtempe sian propran mankon da mono necesa al efektiviĝo de siaj ideoj. Dua bonŝanco, la mastro taŭge taksis la valoron de la sugestoj kaj finance helpis al la realigado. Post tri monatoj, Ĵakar jam prezentis teksilon kiu anstataŭigis per mekaniko la ĝenan kaj lacigan laboron de la metiisto. Tiu teksilo estis premiita per bronza medalo ĉe ekspozicio pri Nacia Industrio en Parizo en la jaro 1801. Eĉ pli, la ministro Carnot vizitis lin en Liono kaj gratulis. La sekvantan jaron, la « Society of Arts » de Londono proponis premion por invento de maŝino por fabriki retojn de fiŝistoj. Ĵakar provis... kaj solvis la problemon.

Tiam, la franca imperiestro Napoleono la I-a, al kiu la ekonomia kaj industria evoluiĝo de Francio estis grava afero, sciinte pri Ĵakar pere de raporto el la prefekto de Liono, alvokis lin veni en Parizo kun sia maŝino. Napoleono akceptis lin tre afable, montris veran intereson eĉ entuziasmon. El tiu intervjuo rezultis, ke oni donis al Ĵakar loĝejon en « Konservatorio pri Artoj kaj Metioj » en Parizo, taŭgan salajron kaj rajton ĉion esplori. Inter la valoraj muzeaj atestaĵoj, li trovis maŝinon kreintan de la fama Vaucanson restintan nur kuriozaĵo tuj komprenis ke tie troviĝas la ĝermo de ideo, kiun li bezonas. Li anstataŭis la cilindron kun truoj per banderolo el kartono, ankaŭ kun truoj. Pere de ili, mekanismo prezentis al teksisto la fadenojn de la varpo, laŭ la dezirata desegno. Samtempe, alia mekanikaĵo indikis al li la laboron de la glit-bobeno, kiun li devas ĵeti. Tiel, nek la tirknabo, nek la modeligisto restas necesaj. Tre sagace, Ĵakar donacis la unuajn fabrikitajn metrojn el tre riĉa ŝtofo al la imperiestrino. Napoleono estis tre kontenta pri la rezulto. Li ordonis al la plej spertaj francaj metispecialistoj konstruon de teksiloj laŭ la planoj de Ĵakar. Ve ! Reveninte en Liono, tiu-ĉi suferis, kiel ĉiam suferas pioniroj. Liaj samurbanoj konsideris lin kiel malamikon. La metiistoj kredis ke la novaj mekanikoj estos mortigaj por ilia metio. Ili kunvenis tumulte kaj decidis detrui la maŝinojn. Nur la interveno de la soldatoj malpermesis tion. Poste, okazis novaj tumultoj. Oni eĉ kaptis Ĵakar kaj freneza hom-amaso tiris lin tra la kajo por dronigi lin en la rivero. Nur lastmomente oni venis por savi lin. Tamen, la altvaloro de lia teksilo estis neneigebla. Kelkaj anglaj fabrikantoj instigis lin iĝi angla civitano. Ĵakar rifuzis plej profitodonajn proponojn. Estas tiam sed nur tiam, ke la Lion-anoj akceptis la Ĵakar-teksilon ĉar, fine, ili komprenis, ke alie oni povus forŝteli la prosperon de la Liona silkteksado.

Post nelonge, la maŝino de Ĵakar estis uzita por ĉiuj specoj de teksado. Ĝia uzo pruvis, ke la timoj de la stultaj metiistoj estis tute falsaj kaj senbazaj. La nombro de la dungitoj tute ne malkreskis. Male kaj surprize, eĉ por Ĵakar mem.

La reston de sia vivo, li pasigis kviete kaj pace. La lokaj instancoj invitis lin daŭre perfektigi sian teksilon por la bono de la loka industrio, proponante pensionon fiksotan de Ĵakar mem. Li elektis tute modestan sumon.

Je la aĝo de sesdek jaroj, li sin retiris al la patra naskiĝovilaĝo, kaj tie pasis la reston de sia vivo. Tie li ricevis la ordenon de la Honor-legio. Tie, li mortis en la jaro 1834, plena je jaroj kaj honoroj.

B. CHEVERRY

# LA SOLULO MORTOS

Jam de sep jaroj la tropika Afriko suferas teruran preskaŭ seninterrompan sekecon. Sur la ĉielo ne plu estas nuboj promesantaj pluvon, sed nur vulturoj kaj marabuoj, kiuj serĉas sur la grundo la bovinojn, kiuj mortis pro soifo. Pri akvo, estas senkompata lukto.

La vastega lago de Talba, situanta inter Somalio, Etiopio kaj Kenjo estas la nura akvopunkto laŭlonge de la venontaj monatoj kaj laŭ 300 kilometra radiuso por miloj da bestoj kondukitaj de la nomadaj paŝtistoj.

Tiun ĉi jaron, alvenis en la ĉirkaŭaĵojn de Talba ĉiaj sovaĝaj bestoj en nenombreblaj kvantoj, ege pli multe ol en la antaŭaj jaroj. Unue, pobande, alvenis la elefantoj kuntirante post si ĉiajn loĝantoj de la savano : ĝirafoj, gazeloj, antilopoj, bubaloj. En tiu ekstreme sekeca periodo la subita alfluo de tiu fremda faŭno pligravigis la akvo-problemon.

En la komenco, homoj, brutaro kaj sovaĝaj bestoj instinkte dispartigis inter si la tieajn akvojn. Kiam la akvo malpliiĝis, ĉiu ŝajnis, laŭ nekredebla disciplino malpliigi sian propran akvo-konsumadon. 24 horojn el 24 oni povis konstati kvazaŭ daŭran alternadon de la soifantoj. La noktaj horoj estis por la bestoj de la ĝangalo : elefantoj, ĝirafoj, fakoĉeroj, bubaloj kaj ankaŭ leonoj kaj leopardoj ; ĉiuj venis por trinki, ne timante la tendojn de la nomadoj, kiuj ĉirkaŭis la lageton. Ek de la unuaj helaĵoj de la tagiĝo, tiu tuta faŭno reiris al siaj densejoj. Tiam milionoj da birdoj, de nenombreblaj specioj, haste sensoifigis sin kaj forflugis al siaj nestoj tuj de la sunleviĝo.

Siavice venis la homoj ; centoj da virinoj plenigis je akvo, ankoraŭ klara, plej diversajn ujojn ; kaj longtempe, sur la bordoj de la lageto iris kaj reiris la portantinoj je ĵaroj, ladboteloj kaj siteloj.

Kaj venis la dombestoj. Ĉiu brutaro ŝajnis kunporti kun si horloĝon kaj restis rande de la lageto nur tempo rilatantan kun ĝia nombro antaŭ ol cedi la lokon al la sekvanta. Tiel dum la tuta tago. Je la sunsubiro la silento falis sur la bordojn ; ne por longa tempo. Kun la unuaj ombroj de la vespero aperis la antaŭgvardio de la noktaj trinkantoj. La ciklo rekomenciĝis.

Tiu ritmo estis interrompita de la nekutima malfruo de la pluva sezono. La nivelo de la akvo malaltiĝis kaj la lago malvastiĝis ĝis ĝi fariĝis nur vasta kota marĉeto. Samtempe la alfluo de la bestoj iĝis pli kaj pli multa. Tiu subita enmigrado ege pezis sur la akvo-kvanto de la lageto.

La angoro kaptis la nomadojn ; ĉiu brutaroproprietulo iĝis malamiko de la sovaĝaj bestoj. Dum la nokto la nomadoj ekbruligis grandajn fajrojn ĉirkaŭ la lageto por forigi la bestojn. La luno desegnis sur la grundo la skeletajn ombrojn de la arboj kaj zumis je la multegaj voĉoj de la nomadoj, kiuj restis sendormaj dank'al la ebriiga lakto de la kamelinoj. Ili senĉese ekscitis la fajrojn. Malgraŭ ĉio multaj sovaĝaj bestoj spitante fajron kaj fumon sukcesis enŝoviĝi ĝis la akvo.

Ĉar la fajroj montriĝis senefikaj plibone estis peti la helpon de la « Argant-oj ».

## LA VENENO, KIU BLOKAS LA KORON

La Argantoj formas kaston de ĉasistoj, kiuj vivas interne de la paŝtista societo. La aliaj provizas sian vivtenon kontraŭ helpo okaze de danĝero. Ili montras rimarkindan kuraĝon en danĝeraj cirkonstancoj ; ĝenerale tiu danĝero venas de la leonoj, kiuj atakas la brutaron kaj eĉ virinojn kaj infanojn ĉirkaŭ la puto aŭ la lageto. Tiam la Argantoj ekĉasas, armitaj de sia kuraĝo, sia sperto kaj sia arko, kiu forĵetas venenigitajn sagojn. Ili malofte malsukcesas. Povas okazi, ke ili perdas sian vivon en la aventuro, sed ĉiam, antaŭe, ilia mortiga sago atingis sian celon ; ĉiapreze la Arganto kondukas sian mision ĝis sukceso. La Argantoj eksplikis sian metodon : terura metodo, sed efika ! Tute simple ili mortigos elefantojn per venenaj sagoj, tiamaniere ke ĝia morto estu horora kun longa agonio, ke ĝiaj veblekoj terurigu la elefantarojn cirkulantaj en la ĝangalo ; ĝia vasta korpo restos surloke por ke la fetora odoro de ĝia putriĝo tenu malproksime la aliajn pakidermojn ; fakte, la elefantoj, pli ol la aliaj bestoj « sentas » kaj timas la morton.

La Argantoj impregnas siajn sagojn per rezino entenanta sukon de strofanto ; estas liano ekstreme venena el kiu oni eltiras la venenon la plej mortiga en Afriko.

Kelkajn tagojn pli poste ili estis pretaj. La feraj pintoj de la sagoj estis forĝitaj ĉe bordo mem de la lageto en improvizita laborejo, meze de multaj magiaj preĝoj kaj ekzorcadoj ; ĉiu pinto estis dediĉita al aparta ĉaso-demono. La veneno estis nigra pasto gluita ĉe la sago malantaŭ la fera pinto ; ĝi havas koagulantajn ecojn ; ĝi igas la sangon « nigra kaj dura » ; ĝi

elrompigas la koron ; fakte la sango minuton post minuto iĝas tiel viskoza, tiel densa, ke la koro ne plu povas ĝin cirkuligi en la arteriojn.

## RUZECO KAJ KURAĜO

La tagon antaŭ la ĉaso, la plej juna el la Argantoj kontrolis la bonan efikon de la veneno, propravole provante ĝin sur sia propra sango. Li faris al si vundeton sur sia antaŭbrako ĝis la manartiko ; la sango fluis ; li ŝtopis la vundon per sia dekstra mano por ke la fluinta sango ne plu tuŝu la vundon ; unu el liaj kunuloj metis sur la ruĝan kaj brilantan likvaĵon la venenan sagon ; en kelkaj momentetoj la sango transformiĝis en brunaĉan ŝaŭmon, kiu sekiĝis, krispiĝis en violaĉan-nigran koagulaĵon.

Estis necese ankaŭ determini la plej taŭgan lokon, por la murdo de la elefanto ; ne tro proksime por ke la kadavro ne infektu la akvojn de la lageto ; ne tro malproksime por ke la aliaj elefantoj ne venu ĝis la bordo. Pri la baldaŭa viktimo oni prefere elektis unu Solulon por eviti la danĝerajn reagojn de la elefantaro.

Trovi Solulon postulis kelkajn tagojn ; unue oni devis trovi en la koto de la bordoj ĝiajn spurojn, kelkfoje akompanataj de ĝiaj fekaĵoj, kaj ilin laŭsekvi ĝis la labirintaj densejoj, kiujn ĝi ŝatas ; poste oni ĝin longe observis por malkovri ĝiajn nutrajn kutimojn kaj ĝiajn reagojn, antaŭ ol ĝin direkti al la lageto ; tio ĉi okazos dum la tago kaj ne dum la nokto por precize celi ĝiajn artikojn.

La viroj sukcesis elarbarigi la Solulon kaj devigis ĝin veni en senarbejon. Jam la Argantoj eksaltas el la ĝangalo, kiu ilin kaŝis. Por precize celi necesas esti stara, sen nenio ĝenanta. Ili kiel eble plej multe alproksimiĝas al la besto. La viroj kuras al ĝi. La elefanto konscias la ĉeeston malantaŭ si de tiuj armitaj viroj, kiuj baras al ĝi la vojon al la ĝangalo ; ĝi, daŭre kaj peze, antaŭeniras al la lageto. Subite ĝi haltas, turniĝas ; ĝi sentas la danĝeron ; ĝi prepariĝas por sturmi ; ĝiaj vastaj oreloj batas la aeron ; ĝia rostro stariĝas, provante kapti la odorojn, kiuj ĝin informos pri ĝia situacio. Unu viro restas fronte al la Solulo por fiksi ĝian atenton dum la aliaj ŝoviĝas ambaŭflanken de la besto. Ili singarde translokiĝas en la altaj herboj, tiel klinantaj, ke ili ŝajnas rampi. Tiu manovro metas du ĉasistojn sub la vento. La elefanto sentas ilian odoron. Tuj ĝi komprenas, ke ĝi estas ĉirkaŭita ; ĝi furioze turniĝas ; je tiu momento la du unuaj sagoj, siblante, trairas la aeron. Nun oni galopas malantaŭ la fuĝantan pakidermon, kiu stumblas en la herboj kaj la radikoj ĝis spirmanko. De tempo al tempo la besto haltas, duone turniĝas, ŝajnigas sturmi. Tiam, je ĉiu halto, almenaŭ duona dekduo da sagoj flugas. La elefanto devas morti en la ĉirkaŭaĵoj de la lageto.

Kiom da tempo depost la unua sago ? 50-60 sekundojn ? Kaj subite, por la unua fojo la elefanto peze sinkas sur siaj antaŭaj genuoj ; ĝi stariĝas, blekante sian angoron. La viroj forkuras ĉiudirekten ; ili scias, ke, en tiu momento, la elefanto iĝas ekstreme danĝera. Alia raŭka blekado anoncas tujan sturmon. Sed la elefanto turniĝas, ekmarŝas per kruroj ŝanceliĝantaj, preskaŭ falditaj. Estas evidente, ĝi volas trovi rifuĝon en la bukedo de dornaj plantoj, kiu staras inter la savano kaj la lageto ; ĝi eniras en ĝin en krakado de pulvorigitaj sekaj branĉaroj. Alia blekado kaj la besto sinkas sur sia flanko. Estas la plej kruela momento. La agonio estas longa. La Argantoj observas ĝin sen emocio. Eĉ ili ne provas ĝin mallongigi per alia sago. Kial fuŝuzi la multvaloran venenon ? Estas nur unu vivo, kiu malaperas por protekti aliajn vivojn.

Nun la elefanto estas vere morta. La nomadoj alkuras, tre ekscititaj. En iliaj okuloj oni legas la novan esperon de postvivo.

Oni zorge senbranĉigas la dornan bukedon. Du junuloj gardostaras antaŭ la dentegoj de la pakidermo, kiujn ŝtataj funkciuloj venos forpreni post kelkaj tagoj, laŭ la reglamento de la lando. Aliaj viroj larĝe tranĉas en la dika epidermo de la kadavro por faciligi la putraĵon, kiu forigos la aliajn elefantojn.

Alte sur la ĉielo jam flugas centoj da vulturoj kaj marabuoj sin pretigantaj por la festeno. Iliaj bekoj kaj ungegoj plugos la internon de la besto kaj helpos la agon de la suno.

Ju pli rapide la odoro de morto ŝvebos en la senmova aero, despli rapide foriros la aliaj bestoj.

Tri maskloj venis dum la nokto. Ili cirkaŭis la korpon. Ili opiniis ĝin vundita aŭ kapita de kaptilo. Ili klinis la kapon kaj per siaj dentegoj provis levi sian kamaradon. Ili tuj komprenis, ke estas plu nenio farenda, kaj ke tiu odoro estas tiu de la morto. Ili rapide forfuĝis.

# OMAĜE AL GIFFORD FOWLER

## EKSTRAKTOJ EL LIA VERKARO

### Traduko de versoj de nekonata aŭtoro de la 17a jaro.

Per vestostilo ŝi sin montras sprita,
Ĝi ĉiam taŭgas vere :
Ŝi daŭre iras laŭ sezon'vestita.
Kaj vintre, kaj somere.
Por kanto inda tem'
Vestita ŝia ŝajn' !
Sed estas ŝi la belo mem
Sen vesto kia ajn !

## PANTUNO KUN RIĈAJ RIMOJ

Liĝea legis la biblion :
Mi vidis, ke ŝi estas bela.
Min venkis, mi ne scias plion
De bruna buklo flirt' ribela.
Mi vidis, ke ŝi estas bela.
Ŝi ne rigardis nek parolis.
De bruna buklo flirt' ribela.
Kiel kaptila maŝo rolis.
Ŝi ne rigardis nek parolis.
Mi sentis, ke jam estas tempo !
Kiel kaptila maŝo rolis
Juneco, belo kaj printempo.
Mi sentis, ke jam estas tempo !
Mi ŝin rigardis kaŝe, strabe.
Juneco, belo kaj printempo
Instigis preni kison rabe.
Mi ŝin rigardis kaŝe, strabe :
Min venkis, mi ne scias plion,
Instigon preni kison rabe.
Liĝea legis la biblion.

## ZAMENHOF-TAGO (1956)

Pri okulkuracisto pola
Ni revas dum ĉi-tiu tago,
Per bildo pentra kaj kolora
Ni serĉas lin en la imago
Ĉe li malriĉaj homoj sidis
Por okulvitroj laŭ bezono,
Foriris kaj pli bone vidis,
Per amo pagis pli ol mono
Miopa estas la homaro,
Pro nevidado ne komprenas
Miopan fraton trans la maro,
Pro nekompreno abomenas .
La kuracisto vitrojn donas
Per kies povo ni la koron
De alilanda frato konas
... sen vidi lian haŭtkoloron !

## KRISTNASKO (1968)

Favoron spertis reĝoj tri
El fora oriento,
Serĉantoj de la vera Di'
Survoje en konsento ;
Por gvidi ilin al la cel'
Ekbrilis nokte sur ĉiel'
Mirinde bela montrostel',
Mirinda monstrostelo !
Paŝtistoj favoriĝis pli
Sur montoj kun la grego,
Ĉar venis ĉefanĝel' de Di !
Kun la anĝelarego.
Invitis ilin tiu ĥor'
Al Bethlehem, ne longe for,
Rapidi ĉiuj por ador'
Rapidi por adoro !
Sed favoregon spertis vi,
Ho ! brava bov' de tiro :
En via trogo kuŝis Di !
Sub varm' de via spiro.
Kaj hontis nek Patrin' nek Fil'
Ĉe vi troviĝi en azil'
Nin benu Dio per humil',
Nin benu per humilo !

## VINTRA POEMETO AŬ PRESKAŬRIMOJ

Mortis dum lasta nokto la fontano,
Viktim' humila de kruelo vintra,
Funebre ni vizitis je mateno
Ŝian kadavron en la ĉerko vitra.
Ŝi revivetas nun en hor' degela,
Kaj ŝiaj larmoj falas, gem' post gemo,
Dum lante akvo en la kruĉ' argila
Grimpas laŭ la eskalo de la gamo.

26 3-71

## RADIKOJ KAJ FRUKTOJ

Muelisto la praavo,
Kaj la avo faris malton.
Lin memoras mi blankbarban,
Portis tre mallongan palton.
Muelisto sur rivero,
Kaj maltisto en vilaĝo,
Kun la sanaj antaŭjuĝoj
Kaj la kamparana saĝo.
Kial loĝas mi en urbo ?
Farĉas min per libro-scio ?
Perdis simplon, perdis saĝon,
Perdis kredon eĉ je Dio ?
Mi komprenas logaritmojn,
Konas lingvojn, faras versojn,
Kaj rikoltas plakitaĵojn :
Ili fosis krudajn ercojn !

22 VIII 73
Ruislip

# POR VIA DISTRO

## SOLVOJ DE LA ANTAŬAJ PROBLEMOJ

### KRISTNASKAJ DONACOJ

Je la unua vido, ŝajnas ke tiu problemo ne estas korekte proponita : mankas precizigo. Sed oni devas rimarki ke, kiam oni diras ke unu el la nepinoj ricevas la duonon de la sumo ricevita de la du aliaj ambaŭ, tio signifas ke la aĝo de la plej juna estas la duono de la sumo de la aĝoj de la du aliaj. Estu a, b, c tiuj tri aĝoj. Je iu dato, oni havas : b = (a + c) /2, aŭ 2b = a + c. kelkaj jaroj poste aŭ antaŭe, la aĝoj de la nepinoj estos a + k, b + k, c + k kaj oni povas skribi (a + k) + (c + k) = 2 (b + k).

Ni diru ke en la unua jaro kiam la avo decidis fari tiujn donacojn la aĝo de la plej juna estis y kaj la aĝo de la dua x. Laŭ la unua konstato, la aĝo de la plej maljuna estis x + y, laŭ la dua konstato oni povas skribi 2x = y + (x + y), tio estas x = 2y. Konklude oni povas diri ke en la unua jaro, la aĝoj de la tri nepinoj estis y, 2y, 3y jaroj. La nombro da 5-stelaj moneroj ricevitaj tiam estis do 6y (laŭ la tria konstato), kaj la nombro da jaro inter la unua jaro kaj la lasta kristnaska festo estis la du trionoj de tiu nombro, t.e. ; 4y jaroj. La aĝoj de la tri nepinoj dum la lasta kristnaska festo estis do 5y, 6y, 7y jaroj. Unu el ili estis 21 jara, kaj y devas estis entjero, do la nura valoro ebla por y estas y = 3.

Dum la lasta kristnaska festo la aĝoj de la tri nepinoj estis : 21, 18, 15 jaroj.

### KRUCVORTOJ

| | A | B | C | D | E | F | G | H | I | J |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 1 | O | K | U | L | O | J | ■ | I | L | O |
| 2 | R | A | N | O | ■ | O | R | G | E | N |
| 3 | E | P | I | Z | O | D | O | ■ | G | O |
| 4 | L | O | K | A | ■ | L | O | ■ | I | M |
| 5 | O | R | A | N | Ĝ | O | ■ | I | T | A |
| 6 | ■ | A | ■ | Ĝ | ■ | ■ | B | L | I | T |
| 7 | A | L | L | O | G | I | ■ | A | M | O |
| 8 | B | O | A | ■ | A | N | ■ | R | I | P |
| 9 | I | ■ | C | E | N | T | R | O | ■ | E |
| 10 | O | P | A | ■ | T | A | O | ■ | I | O |

## NOVAJ PROBLEMOJ

### Kiu estas la murdisto ?

1) Estas 5 kunmanĝantoj.
2) Kiu stomakdoloras, tiu sidas apud kiu ricevis kiel donacon libron.
3) La kunmanĝanto kiu alportis sangokolbason sidas tute maldekstre.
4) La gastiganto stomakdoloras.
5) Kiu alportis bovajon, ricevis kiel donacon aŭtomobilon.
6) La kampara kuzo kantis « la aŭtuno »-n.
7) Kiu alportis ostrojn kapdoloras.
8) La kampara kuzo sidas dekstre de la belulino.
9) Iu kantis « la feliĉo »-n.
10) Kiu hepatdoloras, ricevis kiel donacon gantojn.
11) Kiu genudoloras, kantis « donu al mi vian manon ».
12) La gajiganto alportis kaviaron.
13) Kiu kantis « la tagiĝo »-n, sidas meze.
14) Kiu naŭzas, sidas apud kiu ricevis kiel donacon vazon.
15) Kiu alportis trufojn, kantis « la espero »-n.
16) Kiu alportis sangokolbason, sidas apud la gastigantino.

Demando : Kiu el tiuj 5 ricevis kiel donacon revolveron kaj uzis ĝin ?

### Kaŝita poemo

La tuto konsistas el 152 literoj kaj formas unu strofon de konata esperanta poemo. 119-19-37-41-27-21-69 dunaskitoj ; 127-83-134-148-44-71 grimpanta vegetaĵo ; 59-4-76-105-54-96-57-24-70-137-49 bestkuracistoj ; 79-63-37-29-9-66-18-126-129-39 deklinacia kazo ; 143-101-54-146-112-62-104 parto de ŝipo ; 131-85-55-17-76-13-28-60-80 propravole sen ekstera influo, meminiciate ; 140-94-118-18-144-78-91 pusa ruĝa haŭtŝvelaĵo ; 67-77-136-7-115-107-103-27-117-35 ekzaktaj reproduktaĵoj de skribo ; 75-25-71-145-42-26-150-89-84-32-91-22 homoj, kiuj faras tombornamaĵojn ; 1-135-40-99-108-12-29-72-21-92 edziniĝintoj ; 31-15-50-45-65-130-106-110-8-102-46-56-39 eŭropanino ; 114-26-122-89-45-108 mambesteto ; 44-2-74-87-147-107-58-5-47-151 restaĵo el fruktoj post ekstrakto de suko ; 53-149-47-132-16-52-116-30-139-36-61-97-123 homo, kiu plenumas gravan taskon (konstruon de domo ekz.) ; 13-124-23-43-78-86-51-32-142 speco de risorta pafarko ; 90-73-37-55-109-34-25-152-128-18-82-3-111 montra pronomo aŭ adjektivo ; 125-8-121-20-68-65-11-138 hindaj marĉarbaroj ; 95-48-81-33-113-98-14-141-104 plej malalta universitata titolo ; 64-120-38-133-12-46-97-11 homo tro amanta la komforton ; 88-6-10-93-82-100-63 anilina ruĝaĵo.

# GRAMATIKO PER BONHUMORO

### NOMAJ FUNKCIOJ DE SUBSTANTIVO

**Apudmetita substantivo** (apozicio, ekvivalento, nomesprimo, vokativo).

— la diablo lin prenu, **la sentaŭgulon**
— ni recevis duoblan salajron, t.e. **mil frankojn**
— vi konas mian filon Karlo
— mi amas vin, Karlo.

**Suplemento**

— **de substantivo :** la domo **de patro**
— **de adjektivo :** preta **por ĉio**
— **de adverbo :** norde **de la urbo**
— **de nepredikata verbo :** suferi **pro la** vero.



**La valoro ne atendas la nombron de la jaroj**

Jakson, mi prezentas al vi mian filon Benjameno. Mi nepre postulas, ke li ekzerciĝu en ĉiuj fakoj de nia firmao. Li komencos lundon tute malsupre, kaj venontan semajnon li estos subdirektoro.




**Ek al esperanto**

Mi sentas min preta por tuj lerni esperanton. Sed mi petas vin, rapidu ; ene de tiu vortaro certe estas la traduko de tiuj signoj ! Mi ne povas pli longe suferi pro la problemo de la lingvoj !



**Posteularo**

Jes, ĉi tie estas la Muller-familio. Vi estas preta por interparolado kun Sinjoro Muller ? Sed al kiu vi volas paroli ? ĉu al la patro Adolfo ? ĉu la filo Baptisto ? ĉu al nepo Godfredo ? ĉu al la pranepo Cipriano ?

# Niaj perantoj

**Aŭstrio :** S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (80 aŭstr. ŝil.).
**Belgujo :** S-ro Guyot Mateo, 18, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (160 fr.).
**Britujo :** S-ro John Rapley, 156, Wanstead Park Rd., ILFORD, Essex IGI 3 TP, ĝiro 50 292 3008 (160 p.).
**Danlando** : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (25 kr.).
**Finnlando** : S-ro Jussi Jäntti, Esperantotie 4, SF 02220 IRISLAHTI (16 mk).
**Germanujo Okc. :** S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (10 mk.).
**Hispanujo :** S-ro Manuel Romero Gomez, Arzobispo Apaolaza, 32-Ent. A ZARAGOZA (240 pes.)
**Italio :** S-ro Gaudenzio Pisoni, via Benedetto Affieri, 24, 28100 NOVARA — p.ĉ. 23/16532 (2 000 lires).
**Japanujo :** S-ro Tara Niŝiumi, 6-31-19 Kita-Koiwa Edogawa-Ku, 133, TOKIO - pĉ Tokio 44163 (1 200 jenoj).
**Jugoslavio** : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (60 d.).
**Nederlando :** S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk. 209721 (10 guld.).
**Norvegujo :** S-ino Marit Delor, Solveïen 143-B, LJAN (24 kr.).
**Peruo :** S-ino Skotte, Malecon Paul-Harris, 336, Dto 200 BARRANCO (Lima).
**Pollando :** Pola Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO.
**Rumanio :** S-ro Adrian Boldan, al. Valea Rosie 4, ap. 69, B.P. 8/4 BUKURESTI - 66.
**Sovetunio :** S-ro Alik Melnikov, ab jaŝ 233 Rostov Don — 7.
**Svedujo :** ESPERANTOFORLAGET, Fack. 200 42 MALMO 7, ĝiro 578 (18 kr.).
**Svislando** : S-ro Cl. Gacond, Miéville, 133 - 2314 LA SAGNE (14 fr.).
**Tajlando :** S-ro C.L. Unchitti, GPO Box 1231, BANGKOK (5 us. dol.).
**Usono** : S-ro D.W. Hoffman, 1444 Leslie Street, HILLSIDE (N.J.) (5 dol.).
**Aliaj landoj :** Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per respond-kuponoj (20 respk.).

---




# KASTELO GRÉSILLON

**BAUGÉ**
**Maine-et-Loire**
**FRANCUJO**

# ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

***Akceptas :***

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

## *VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO*

**Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :**
**ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ** (Maine-et-Loire) Francujo



Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier

Le Gérant : P. BABIN

*Supplément au n° 2 de 1975, de « KULTURAJ KAJEROJ »*

# LA VIE DE GRÉSILLON

## ENTRE NOUS...

**La rencontre de Pâques des enfants est terminée depuis deux jours lorsque j'écris ces lignes. Ils étaient trop peu nombreux ces enfants ; d'horizons différents, mais tous Français. Est ce à dire qu'il s'agit d'un échec ? Sur le plan « commercial » ce n'est pas une bien grande réussite, d'autant plus que la température peu clémente nous a obligés à chauffer le château presque en permanence. Le nombre de participants pendant cette première semaine n'a pas atteint quarante. Mais l'ambiance de travail a été magnifique. Les deux niveaux de cours ont été très suivis et un autre niveau pour de très jeunes enfants a été mis sur pied avec succès. L'après midi, des groupes, entraînés par les plus grands ont rédigé, en esperanto bien sûr, et tiré une brochure relatant leurs travaux et leurs promenades. Les jeunes participants ont également composé et présenté des sketches au théâtre de marionnettes. Et, le samedi, dans le car qui les emmenait à l'inauguration de la rue Zamenhof à Tours, spontanément ils ont chanté, en esperanto, tout leur répertoire. On n'a guère parlé que l'esperanto pendant ces deux semaines. Malheureusement le cours de pédagogie n'a pas fonctionné comme nous l'espérions. Le nombre des intéressés était extrêmement réduit. Mais les quelques échanges dans ce domaine ont été très enrichisants en raison de la présence de l'un des maitres allemands ayant accepté de participer à la prochaine expérience d'ILEI. Il est dommage que la seconde semaine ait connu une participation encore plus réduite que la première. Le « cours » très informel a été enrichissant pour tous grâce à une participation active des quelques stagiaires.**

**La conclusion à tirer de cette période de Pâques et du programme prévu est, je pense, que malgré le peu de participants cette année il faut la renouveler l'an prochain en espérant que davantage de responsables de cours d'esperanto pourront amener certains de leurs élèves et confronter leurs expériences. Qu'ils sachent que sur le plan qui les intéresse ce stage a été une réussite. Il faut que dès maintenant ils pensent aux subventions possibles. Il faudrait qu'à Pâques 1976 une dizaine de maitres de pays différents viennent, chacun accompagné de quatre ou cinq élèves. La confrontation serait extrêmement intéressante et constituerait certainement un nouveau pas, parallèlement à l'expérience alors en cours, vers l'introduction de l'enseignement de l'esperanto dans les programmes scolaires.**

**P. BABIN.**

## NOS JOIES

Yann Leriche, fils de Françoise et Michel, petit-fils de Renée Lenel, nous a dit sa joie d'avoir, depuis le 19 mars, une petite sœur, Gaëlle. Tous nos compliments et nos vœux.

## NOS PEINES

Juanita Turbillon, de Tours, amie de Grésillon, a eu la douleur de perdre sa mère. Elle voudra bien trouver ici le témoignage de la sympathie de tous ses amis.

C'est avec beaucoup de peine que nous avons appris la disparition de M. G. Fowler. C'était un fidèle ami de Grésillon, qui a collaboré à de nombreuses reprises à Kulturaj Kajeroj.

## LA REVUE

Merci à tous ceux qui ont réglé très vite leur abonnement 1975. Ils sont nombreux, ainsi que ceux qui ont souscrit un abonnement bienfaiteur ou même plus. Nous espérons que les retardataires vont se mettre en règle très rapidement. Merci d'avance.

## ABONNES BIENFAITEURS

| | |
|---|---|
| Mlle Vazon (79) | 20,00 |
| M. Gente (84) | 20,00 |
| M. Sacetto (13) | 20,00 |
| M. Chini (13) | 20,00 |
| Foyer Aix (13) | 20,00 |
| S-ro Vladov (Bulgarie) | 20,00 |
| M. E. Motillon (37) | 20,00 |
| M. G. Motillon (37) | 20,00 |
| F-ino Cichova (Tchécosl.) | 20,00 |
| S-ro Climent (Espagne) | 20,00 |
| S-ro Grim (Tchécosl.) | 20,00 |
| S-ro Mazur (Tchécosl.) | 20,00 |
| M. Gracia (66) | 25,00 |
| Mme Suchareau (75) | 20,00 |
| M. Aude (37) | 20,00 |
| M. Villegier (73) | 20,00 |
| M. Gallet (38) | 20,00 |
| M. Llech Walter (66) | 20,00 |
| Mlle Llech Walter (66) | 20,00 |
| M. R. Martin (35) | 60,00 |
| Mme Pral (69) | 20 00 |
| M. Serre (66) | 50,00 |
| Mlle Leclercq (80) | 30,00 |
| Mme Hortolan (34) | 25,00 |
| Mme Buzinsky (61) | 20,00 |
| Mlle Soulisse (14) | 20,00 |
| M. Poly (75) | 20,00 |
| M. Péraire (33) | 20,00 |
| M. Bruguier (30) | 30,00 |
| M. Bourry (18) | 20,00 |
| M. Apcher (84) | 20,00 |
| Mme Lucas (76) | 20,00 |
| Mlle Hédelin (75) | 20,00 |
| Mme Brousse (75) | 20,00 |
| Mme Tissot (42) | 20,00 |
| Mlle Chérault (33) | 25 00 |
| Mme Laffargues (33) | 20,00 |
| Mlle Bettmann (75) | 30,00 |
| M. Cavelan (83) | 20,00 |
| Mlle Robin (92) | 20,00 |
| M. F. Jelenc (86) | 25,00 |
| M. P. Jelenc (U.S.A.) | 25,00 |
| M. Gérard (75) | 20,00 |
| M. Bossard (44) | 20,00 |
| M. Barré (44) | 20,00 |
| S-ro Futran (U.S.A.) | 25,00 |
| S-ro Mac Lennan (Grande-Bret.) | 22,00 |
| M. Fourreau (69) | 20,00 |
| S-ro Kuhn (All. Féd.) | 20,00 |
| M. Guillaud (76) | 20,00 |
| M. Habermehl (67) | 20,00 |
| M. Thibé (Belgique) | 20,00 |
| M. Bracquemond (63) | 20,00 |
| Thiers-Esperanto (63) | 20,00 |
| M. Regard (45) | 20,00 |
| M. Berthod (06) | 20,00 |
| M. Hénaux (92) | 20,00 |
| M. Bergerot (88) | 20,00 |
| M. Saudian-Rousseau (95) | 50,00 |
| Mme Rigal (27) | 20,00 |
| M. Amouroux (66) | 20,00 |
| M. Métivier (49) | 20,00 |
| Mme Ménard (49) | 20,00 |
| M. Denès (44) | 20,00 |
| M. Ménard (44) | 20,00 |
| M. Richard (44) | 20,00 |
| M. Lafargue (44) | 20,00 |
| Mme Guiny (72) | 20,00 |
| M. Hubert (49) | 20,00 |
| M. Le Marquant (22) | 20,00 |
| M. Lecoq (37) | 20,00 |
| M. Le Bourhis (56) | 20,00 |
| M. Ringotte (59) | 20,00 |
| M. Rabin (49) | 20,00 |
| M. Moulin (95) | 20,00 |
| Mme Cuvelier-Delassus (59) | 20,00 |
| M. Lloancy (Tunisie) | 20,00 |
| M. Coussé (72) | 20,00 |
| M. Contard (62) | 20,00 |
| Mlle Carré (69) | 20,00 |
| M. Guillou (22) | 20,00 |
| M. Guyon (92) | 40,00 |
| M. Friedlander (92) | 20,00 |
| M. Gaudry (92) | 20,00 |
| M. Thiébaud (70) | 20,00 |
| M. Lefebvre (72) | 20,00 |
| M. Génau (17) | 20,00 |
| M. Selle (92) | 20,00 |
| Mlle Delisle (75) | 20,00 |
| M. Robert (33) | 20,00 |
| M. Villeneuve (91) | 20,00 |
| M. Bodereau (72) | 25,00 |
| Mlle Prigent (84) | 30,00 |
| M. Derks (Monaco) | 20.00 |
| Grupo Konkordo (63) | 20,00 |
| Mme Crépel (35) | 20,00 |
| Mme Montagné (27) | 20,00 |
| Mme Cnudde (59) | 20,00 |
| M. Buérick (62) | 20,00 |
| Mme Claitte (69) | 25,00 |
| M. Rival (42) | 50,00 |
| Mme Moreau (06) | 50,00 |
| M. Jannez (30) | 20,00 |
| Mlle Dufrenne (69) | 20,00 |
| Mme Romagny (69) | 20,00 |
| M. A.R. Corneia (Portugal) | 20,00 |
| Mme Jurquet (13) | 20,00 |
| M. Deyrolles (13) | 20,00 |
| Groupe Esp. Marseille (13) | 20 00 |
| M. Legros (59) | 20,00 |
| Mme J. W. Dijkstra (Pays-Bas) | 55,00 |
| Mme Reynaud (84) | 20,00 |
| M. Noël (76) | 30,00 |
| M. Schertzer (67) | 30,00 |
| Mlle Gallon (69) | 20,00 |
| Mme Rocca (69) | 20,00 |

| | |
|---|---|
| M. Jérôme (77) | 20,00 |
| Mlle Duchamps (47) | 20,00 |
| M. Piron (75) | 20,00 |
| Mlle Odon (10) | 20,00 |
| M. Vayssières (77) | 20,00 |
| Mme Salmon (49) | 20,00 |
| Mlle Kerlouédan (36) | 20,00 |
| M. Boulogne (36) | 20,00 |
| M. Bonamy (36) | 20,00 |
| M. Aix (36) | 20,00 |
| M. Fourcade (66) | 20,00 |
| M. Coupeau (72) | 20,00 |
| M. Lherbier (72) | 20,00 |
| Mme Capit (44) | 20,00 |
| M. Gérard (93) | 20,00 |
| M. Thierrat (75) | 20,00 |
| Mlle Bossuet (33) | 20,00 |
| M. Védrine (69) | 20,00 |
| **TOTAL** | **2 997,00** |

# Compte-rendu de l'assemblée générale du 6 Avril 1975

L'assemblée désigne à l'unanimité MM. Boyer et Mathé respectivement comme président et secrétaire de séance.

Sont absents excusés : Mmes et MM. Berthelot, Chevalier, Clair, Philippeau, Vazon.

Sont présents : Mmes et MM. Babin, Boyer, Bodereau, Bénistant, Brigard, Cheverry, Ciret, Dairon, Friedlander, Guillaume, Guillot J.-P., Jelenc, Mathé, Métivier, Michaud, Mousset, Prévot.

Le nombre d'actionnaires présents ou représentés s'élève à 225 (pour un total de 379), représentant un capital de 56.000 F ; le quorum étant atteint, la séance est déclarée ouverte à 10 h. 20 par le Président qui donne lecture de l'ordre du jour.

La parole est laissée à M. Babin.

1) **RAPPORT FINANCIER :**

**Recettes.** — M. Babin fait remarquer que les séjours sont en augmentation de 10 % par rapport à 1973 (+ 13.500 F), ce qui correspond à une augmentation des tarifs mais non du nombre de participants ; les recettes tickets correspondent au relèvement des prix de vente ; les activités culturelles sont en augmentation d'environ 400 F ; par contre le chapitre librairie affiche une baisse de 1.386 F.

**Dépenses.** — Il ressort de cette colonne une nette augmentation du chapitre chauffage - électricité (+ 2.400 F) qui s'explique par la hausse du prix du fuel et le plus grand nombre d'appareils électriques ; augmentation également des salaires, de 18 % ; ainsi que des charges sociales ; des frais d'entretien de 3.800 F. Cependant les impôts sont en baisse d'environ 2.000 F par rapport à l'exercice 1973 ; de même que l'alimentation (ce dernier chapitre s'expliquant par l'approvisionnement en gros dans les grands magasins) et la librairie (beaucoup d'achats ayant été effectués en 1974).

Remarques de l'assemblée : à l'avenir dissocier les lignes « chauffage » et « électricité » ; regrouper « salaires » et « charges sociales ».

L'assemblée adopte à l'unanimité le compte d'exploitation pour 1974.

2) **BILAN 1974:**

M. Cheverry fait remarquer que les disponibilités doivent couvrir les dettes à court terme, ce qui n'est pas le cas en 1974. L'assemblée suggère que les prêteurs transforment leurs prêts en actions pour supprimer la dette à court terme. —

M. Bodereau demande des éclaircissements sur le sens des mots « propriété » à la ligne 1 et 4 chapitres « Immobilisations » et « amortissements ».

Après audition des commissaires aux comptes le bilan 1974 est adopté à l'unanimité.

3) **RESOLUTIONS CAPITAL SOCIAL :**

L'assemblée enregistre les résolutions suivantes :

**1re résolution :** remboursement de la part de Mlle Levrard, décédée, 100 F.

**2e résolution** : 19 nouveaux sociétaires pour un capital de 2.400 F et 23 parts souscrites par des sociétaires pour un capital de 2.300 F. Capital souscrit en 1974 : 4.700 F.

**3e résolution :** départ de sociétaires et inscription de 19 nouveaux sociétaires, ce qui porte le nombre à 379.

**4e résolution :** l'assemblée générale enregistre que le capital social diminuant de 100 F et augmentant de 4.700 F, passe à 86.300 F.

Problèmes des actionnaires dont la M.C.E. a perdu la trace :

1) Actionnaires disparus : une invitation à faire connaître leur nouvelle adresse sera lancée dans « Kulturaj Kajeroj ».

2) Actionnaires décédés : application de l'article 7 des statuts de la Société coopérative M.C.E., le montant des actions détenues par le défunt étant mis en attente sur un compte spécial jusqu'à réclamation par les ayant-droit.

3) L'assemblée générale enregistre la proposition de Mme Michaud : chaque actionnaire est invité à donner la destination de son action en cas de décès.

4) **Résolutions diverses :**

Désignation des commissaires aux comptes. L'A.G. reconduit à l'unanimité MM. Prévot et Berthelot dans leurs fonctions pour 1975.

5) **Rapport d'activité :**

Après dicsussion le rapport est approuvé à l'unanimité.

6) **Stages :**

**Pâques 1975 :** la semaine : rencontre d'enfants, cours de pédagogie animée par MM. Le Magadure, Boyer, Babin.

Les frais de déplacement étant trop élevés, il n'y a pas eu de participation étrangère ; il y a eu en fait 18 français de 7 à 16 ans. Malgré l'absence d'étrangers cette semaine a été un succès sur le plan de la pratique de l'espéranto et de l'ambiance.

Les cours de pédagogie intéressaient principalement MM. Le Magadure et Peek (Allemagne), ce dernier devant participer dans le cadre d'ILEI aux expériences dans quelques écoles d'Autriche, Allemagne, Belgi-

que, Angleterre et France et des cours avec le même livre pendant deux ans. Les contacts furent très fructueux.

**2e semaine :** conversation et pratique, moyenne d'âge des participants : 55 ans ; 20 personnes environ qui ne se sont exprimées qu'en espéranto.

Remarque : pour l'année prochaine faire connaître les dates de ces rencontres plus tôt.

**Eté 1975 :** inscriptions fermes : 1re période : 47 ; 2e période : 24 ; 3e période : 19.

**Encadrement et activités :**

**1re période :** M. et Mme Babin ; cours : MM. Le Magadure, Babin + un étranger.

Activité annexes : reliure : M. Benaim ; vannerie : Mme Lenel ; photo : M. Lahaye ; émaux : M. Leriche ; paraboloïdes : M. Farjon.

**2e période :** personne ne s'est fait connaître à ce jour pour assurer l'administration de ce stage.

Conférences : un certain nombre de conférenciers se sont déjà proposés :

M. Boyer : les redoublements dans l'enseignement français, le rôle du milieu et de l'environnement sur l'intelligence de l'enfant.

M. Casaldos Mimiô : problèmes de linguistique.

R. Llorency : la Tunisie, + une ou deux autres causeries.

Mme Cheverry : la machine et la condition féminine.

M. Métivier : à définir.

Mais il faudra d'autres conférences pour assurer le programme complet du stage.

Activités annexes : reliure, M. Benaim.

Bijoux, perles : Mme Boyer.

**3e période :** adm. M. et Mme Mathé ; cours : Juanita Turbillon, M. Boyer, M. Ribot.

Activités annexes : à prévoir ; Mme Boyer pourrait assurer au début des activités de macramé et de confection de figurines de feutrine.

7) **Affaires diverses :**

— Achats de chaises pour la salle de conférences.

— Prix des séjours d'été : seront les prix de Pâques sous réserve de stabilisation de l'inflation.

— Problème des pouvoirs pour les représentations aux A.G. et les dépôts de candidatures aux élections : chacun doit y réfléchir pour la réunion d'octobre.

— Travaux : seront limités cette année : fin des travaux de tapisserie commencés.

— Personnel de cuisine et service pour l'été : les mêmes cuisiniers qu'en 1974. Services : jeunes filles de 15-16 ans sans heures supplémentaires. Une personne chaque matin pendant 2 heures pour le nettoyage du rez-de-chaussée.

L'ordre du jour étant épuisé, le président lève la séance à 16 h. 30.

Le secrétaire de séance
F. Mathé

---


# Maison Culturelle Espérantiste

## Programme 1975

### ETE

1) — **Arrivée Mardi 1er Juillet. — Départ Lundi 21 juillet.**

**Semaines Esperantistes**

Cours des 3 degrés — Examens — Activités manuelles.
Excursions et visites — Soirées récréatives.

2) — **Arrivée Mardi 22 Juillet. — Départ Lundi 11 Août.**

**Semaines Internationales**

Conférences. — Discussions. — Excursions — Soirées récréatives.

3) — **Arrivée Mardi 12 Août. — Départ Lundi 1er Septembre.**

**Semaines d'Etude**

Cours des 3 degrés — Examens — Activités manuelles.
Excursions et visites — Soirées récréatives.

Inscriptions rapides conseillées à :

*MAISON CULTURELLE ESPÉRANTISTE*
Château de Grésillon - 49150 BAUGÉ